



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Ĉinio subjektive

Prelegos: Petr Chrdle

Post mia [prelego pri Koreio kaj Japanio](#) mi prezentos miajn impresojn de Ĉinio (Ĉina Popola Respubliko kaj ankaŭ Tajvano). Ĉar mi ne estas sinologo, nek mi estadis tie longdaŭre, temos pri miaj subjektivaj rigardoj al tiu grandega lando; kiel ĝiaj partoj, kiujn mi havis bonŝancon ekkoni dum miaj tri vizitoj, impresis min. Dume mi prezentos mian ĝuste nun presatan libron pri [Ĉinio, Koreio kaj Japanio](#) kaj se estos intereso ankaŭ aliajn novaĵojn de mia eldonejo [KAVA-PECH](#).

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 15-an de februaro 2022 je 18.00.

Kie: La renkontiĝo okazos rete per Skype

La ligilon mi sendos al vi marde.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.

Renkontiĝo estos registrata.

La prelego okazos antaŭ lanĉo de la libroj [Ĉinio, Koreio, Japanio - Landoj similaj sed diferencaj](#) kaj [Ĉina, Korea, Japansko: Země podobné, avšak rozdílné](#). La libroj aperos merkrede la 16-an de februaro. Danke al kunlaboro de nia klubo kun la eldonisto kaj aŭtoro en unu persona, vi povas antaŭmendi la librojn ĉe mi kaj vi ŝparos sendokostojn. Tiu ĉi propono estas interesa precipe por Brnanoj. Vi ankaŭ povas antaŭmendi aliajn librojn, la liston mi sendis al vi jam lunde. Sufiĉas nur respondi al mia letero. Per aĉeto de la libroj de nia klubo vi subtenos nian klubonaa.

Ceteraj povas mendi la librojn rekte ĉe la eldonisto.

..



Ni rekomendas

- Vizitu [Arbaristan Panteonon](#), belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.
- La 8–10-an de de Aprilo [Instruado de Esperanto Bartošovice](#), Bartošovice
- La 9-17-an de Julio, 2022 [56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj](#), KLAIPĒDA, Litovio

- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice



Cetera programo en februaro

La 22-an **Membra kunveno / členská schůze** Občanský klub, Hybešova 65a

Programo en marto

La 1-an **Kodaj nomoj** – rete per Zoom

La 8-an **Klerigkibernetiko kaj Prof. Helmar Frank** – Josef Vojáček. Občanský klub, Hybešova 65a

La 15-an **Ĉu programisto estas sorĉisto?** – Milan Kolka rete per Skajpo

La 22-an **Legi en fremdaj lingvoj** – Viktoria Schmidbauer (AT) Hybešova 65a

La 29-an **Vojaĝado per Esperanto** – diskuto el la ĉeĥa rete per Skajpo (cílem diskuze je natočit video v češtině o cestování prostřednictvím esperanta. Prosím, abyste si připravili krátké vystoupení, nejlépe i s ukázkou fotografií apod.)

Mi petas vin, ke vi proponu programon por aprilo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA>).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto